# TEJO-aktuale: numero 482, 2023-04

**n°482 | Aprilo 2023**

**Bonvenon!** La lastaj pluraj semajnoj estis aparte plenplenaj de diversaj anoncoj kaj novaĵoj, do jen ili resumitaj! Dum la tagoj plilongiĝas en la norda hemisfero, restas tamen malpli ol 100 el ili ĝis la **Internacia Junulara Kongreso en Italio**, la plej mojosa evento de la jaro! Ni esperas, ke vi same antaŭĝojas kiel ni, sed ke vi sukcesos atendi ĝis tiam: **multaj aliaj eventoj** helpos vin pacienci kaj elteni. Cetere, ne maltrafu la plurajn malfermajn alvokojn por fariĝi (pli) aktivaj membroj de nia organizo kaj subteni nian movadon. **Havu belan semajnfinon!**

**Riĉigu nian kongreson per viaj konoj kaj interesoj!** Vi povas proponi prelegon, atelieron, aŭ kunsidon pri diversaj fakoj kaj celoj. Aparte invitataj estas sportaj aŭ movadaj programeroj aŭ programeroj kiuj rilatas al la Kongresa Temo. Memoru, ke gvidantoj de akceptitaj programeroj ricevos etan rabaton al sia programkotizo. **Legu ĉiujn kondiĉojn kaj plenigu la formularon!**

**La 80-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en 2024 okazos en Šventoji, Litovio!** Ĝi estos organizita de la Kongresa Komisiono de TEJO, kunlabore kun la Litovia Esperanta Junulara Organizo (LEJO), kiu invitis ĝin. La 80-a IJK estos la unua en Litovio kaj la balta regiono. **Gratulon kaj sukceson al ĉiuj!**

Iĝu Komitatano B de TEJO! Ni bonvenigas kandidatiĝojn por **komitatano B de TEJO** de Junio 2023 ĝis Majo 2025. Restas 3 lokoj kaj nur kelkaj tagoj por kandidatiĝi - la limdato estas la **1-a de Majo**!

La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn al la **Estraro de TEJO por la mandato 2023-2024**. Por kandidatiĝi, sendu mesaĝon al **elekta.komisiono@tejo.org ĝis la 31-a de Majo 2023** kun viaj **vivresumo**, **motiva letero** kaj eksplicita indiko pri la **fakoj** kaj la **oficoj**, kiujn vi estos preta transpreni en la Estraro - se elektita.

Post la granda sukceso de la muzikalo *June kaj Kune*, teamo de junaj aktivuloj kreis du novajn skriptojn por montri al la mondo la unikan kulturon de Esperantujo, kaj dum IJK 2023 ni surscenigos almenaŭ unu el ili. **Ĉu vi aliĝos al la teamo?** Legu pri la serĉataj roloj en

la aliĝformularo, indiku viajn preferojn kaj spertojn, kaj registru vin mem, **ĝis la 31-a de Majo.**

*Ekzameniĝu laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo!* La KER-Ekzamena Centro de UEA okazigos **retajn KER-ekzamenojn en tri niveloj en Junio**. Krome, dum la Universala Kongreso en Torino, eblos trapasi **paperajn ekzamenojn je ĉiuj kvar niveloj** B1, B2, C1 kaj C2.

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando), edukado.net kaj ILEI denove kune organizas **lastan unujaran instruistan trejnadon**! La kursaro necesigas partoprenon unufoje en la surloka intensa semajna sesio en Pollando, kaj la sekvaj sesioj okazos rete. **Limdato por kandidatiĝi estas la 15-a de Aŭgusto**.

# Lastatempa agado

**Nia reprezentanto ĉe AC Konstanze Schönfeld reelektiĝis!** Dum la pasinta Ĝenerala Asembleo de Forumo Junulara Eŭropa okazis la voĉdonado por la membroj de la **KonsilKonsilio pri Junularo** de Konsilio de Eŭropo. La nuna mandato finiĝos je la fino de 2023. Konstanze do plu anos en la KonsilKonsilio dum 2 pliaj jaroj. **Gratulon al ŝi kaj bonan laboron!**

**#SavuEsperanton!** Eble vi jam vidis, ke en Duolingo, la kursoj de Esperanto en la franca, hispana kaj portugala malaperis: estonte, oni nur povos lerni pere de la angla. **Aktivuloj kuniĝis kaj provas ŝanĝi tion, sekvu niajn kanalojn por ricevi pli da informoj!** Atendante, vi povas montri subtenon aliĝante al la kursoj per la jenaj ligiloj: en la hispana, en la franca kaj en la portugala.

# Venontaj eventoj

**Finfine ĝi pretas!** En la semajnfino de la **11-a ĝis la 14-a de Majo** estos la oficiala malfermo de la Esperanto-Stacio kiel kulturcentro kaj seminariejo kun kaj per Esperanto. Ĉiuj interesitoj, amikoj kaj kunlaborantoj de la Esperanto-Stacio estas elkore invitataj en **Halbe, Germanio**!

La **Ŝtata Renkontiĝo** estas la ĉefa evento ĉiujare organizita de AERĴ, kun la celo kunvenigi la esperantistojn de ŝtato Rio-de-Ĵanejro, stimuli la uzadon de Esperanto kaj ankaŭ prezenti la Internacian Lingvon al la ekstera publiko. Ĉi-jare la evento okazos **la 20-an kaj la 21-an de Majo** en la urbo **Niterojo, Brazilo**.

La Germana Esperanto-Junularo denove okazigos **KEKSO-n (Kreeman Esperanto-Kurson)**, de la **26-a ĝis la 29-a de Majo** en **Braunschweig, Germanio**. KEKSO okazos paralele al la **100-a Germana Esperanto-Kongreso** kaj ebligos al junuloj malmultekostan partoprenon ĉe la programo de la kongreso, sed ankaŭ provizos apartajn programerojn.

La **plurlingvula kunveno** okazos **de la 14-a de Junio ĝis la 19-a de Junio en Teresin, Pollando**. Ĝi estas organizata de esperantistoj por plurlingvuloj kaj lingvoŝatantoj. Prelegoj, ekzercejoj, socia kaj kultura programo - sed ankaŭ surprizoj - atendas la partoprenantojn. *Aliĝu antaŭ la 14-a de Majo por profiti specialan prezon!*

BEMI invitas ĉiujn ŝatantojn de biciklado al la **BEMI-semajno** en la Esperanto-Stacio, kun biciklaj ekskursoj taŭgaj por ĉiu nivelo. Okazos en **Halbe, Germanio**, de **la 17-a ĝis la 24-a de Junio 2023**.

Al Roskilde ĉiujare venas famaj muzikistoj el la tuta mondo, kaj la venontjara festivalo certe ne estos escepto! Ĝi okazos inter **la 24-a de Junio kaj la 2-a de Julio**. Venu amuziĝi kaj sperti neforgeseblan Festivalon kune kun internacia Esperanto-teamo, senpage!

**Jam malpli ol 100 tagoj restas ĝis la 79-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos en Lignano Sabbiadoro, Italio, inter la 5-a kaj la 12-a de Aŭgusto 2023!** Legu pli da informoj ĉe la retejo de la evento. Atendante la grandan kongreson vi povas jam babili kun aliaj festontoj en la Telegram-grupo.

---

Trovu pli da eventoj sur la retejo eventaservo.org.

**Por pli da TEJO eventoj, alklaku la bildon!**

---

**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**
**MEMBRIĜU EN TEJO!**

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO**

**Aktuale?**

Sendu viajn novaĵojn al **info@tejo.org** antaŭ la 23-a tago de la monato

Antaŭdankon pro la helpo!

## K o l o f o n o

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2023 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno.

This email was sent to capiscuas@gmail.com
*why did I get this?*  unsubscribe from this list  update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands